


La 3an de decembro 2015

Vizito al provizora domaro en Motomija

La 2an kaj la 3an de decembro 2015 okazis Zamenhofa Festo de Fukuŝima-Esperanto-Societo. Mi estas kvazaŭa membro de tiu societo, loĝanta en la najbara gubernio Gunma. La 2an ni tranoktis en la varmfontejo Dake, kaj la 3an mi iom turismis en la urbo Nihonmacu, kaj posttagmeze mi vizitis la najbaran urbon Motomija,.

Mapo de Fukuŝima



Dank' al mia helpgado por la suferantoj de la Katastrofo, mi renkontiĝis kun homoj, kiujn mi ne neniam renkontus, se ne okazintus la Katastrofo. Pere de instruistino en Fukuŝima mi renkontis s-inon Taĉibana, kiu rifuĝis de la urbo Namie, najbara urbo de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima kaj nun loĝas en la urbo Motomija.

Antaŭ 2 jaroj ŝi eldonis broŝuron pri sia vivo. Mi hazarde akiris ĝin kaj poste aĉetis de ŝi 20 ekzemplerojn por vendi al miaj konatoj en mia urbo. En ĝi ŝi skribis sian karieron jene:

En 1939 mi naskiĝis en Manĉurio en nordorienta Ĉinio, tiam koloniigita de Japanio. En 1946 mi revenis al Japanio.

Poste dum 37 jaroj mi laboris en la urbo Namie kiel instruistino de la angla lingvo. Mi agadis por paco kaj demokratio kiel sindikatano.

En 2000 mi eksiĝis de la laboro.

La 11an de marto 2011 okazis la Katastrofo. Mi suferis pro la nuklea akcidento kaj translokiĝis al la urbo Motomija.

Post la nuklea akcidento ŝi jene spertis rifuĝantan vivon:

Datoj	Rifuĝejoj
La 11an de marto 2011	Ripozejo de la urbo Namie
La 12an~14an de marto	Kunvenejo de la distrikto Cuŝima de Namie
La 15an de marto	Gimnastikejo de la urbo Nihonmacu
La 16an~la 18an de marto	Hejmo de ŝia amiko
La 19an~la 5an de aprilo	Hejmo de ŝia fratino en la gubernio Kanagaŭa
La 6an~la 30an de aprilo	Hejmo de ŝia frato en la gubernio Kanagaŭa
La 1an de majo~la 6an de majo	Hotelo en la urbo Koorijama
La 7an de majo~la 6an de oktobro	Vilao de ŝia amikino en Motomija
La 7an de oktobro~la 25an de junio 2012	Provizora domo en la urbo Motomija
La 26an de junio ~ ĝis nun	Alia pli granda provizora domo en la sama distrikto

Tre severa rifuĝanta vivo! Ĉiuj rifuĝintoj diras, ke ili translokiĝis minimume 5 aŭ 6 fojojn de unu loko al la alia. S-ino Taĉibana nomas sian nomadan vivon kiel la duafojan rifuĝantan vivon truditan de la registaro. La unuan fojon ŝi spertis tian vivon en Manĉurio post la fino de la dua mondmilito, kiam la enmigrintaj japanoj estis postlasitaj inter atakoj de sovetuniaj soldatoj.

Post la nuklea akcidento la urbo Namie fariĝis neloĝebla, do la urba administracio translokiĝis al la urbo Nihonmacu kaj ĉiuj loĝantoj dise loĝas en 31 provizoraj domaroj jene en 11 urboj en la gubernio Fukuŝima. Kompreneble krome troviĝas urbanoj, kiuj rifuĝis en aliaj gubernioj, kaj eĉ en eksterlando.

Koori	1 loko
Nihonmacu	11 lokoj
Fukuŝima	8 lokoj
Motomija	7 lokoj
Sooma	1 loko
Kaŭamata	2 lokoj
Minami-Sooma	1 loko
Sumo	31 lokoj



La provizora domaro en la distrikto Takagi en la urbo Motomija estas unu el tiuj 31. En tiu ĉi domaro troviĝas 3 specoj de domoj: 1K (unu ĉambro kaj kuirejo, banejo kaj necesejo por sola loĝanto), 2K (du ĉambroj ktp por 2 personoj) kaj 3K (3 ĉambroj ktp por pli ol 2 homoj). Komence tie loĝis 62 familioj, sed nun loĝas 35. Sino Taĉibana nun loĝas en la 3K-domo, translokiĝinte de la 2k-domo post kiam

ekestis neuzataj 3K-domoj.

(Maldekstre: Mapo de la provizora domaro de Takagi)



Vizito al ŝia provizora domo

La 3an de decembro ŝi renkontis min ĉe la stacidomo de Motomija je la 1a horo. Ŝia aŭtomobilo kondukis min al la montara distrikto, kie estas sportaj instalaĵoj de la urbo. Oni konstruis la domaron en ĝia parkejo. Tie vicis domaroj. Ŝi haltigis la aŭtomobilon ĉe la kunvenejo, kaj apude estis ŝia domo. Mi volis vidi la internon de ŝia domo, sed ŝi ne invitis min. La suba foto estas enirejo de ŝia domo.



Apud la kunvenejo estis maŝinoj por forigi neĝon. Mi estis surprizita pro ŝia rakonto pri neĝado ĉi tie: “En januaro multe neĝis kaj la tavolo fariĝis unu metron profunda”. En la urbo Namie preskaŭ neniam neĝas, do la rifuĝintoj estis certe konsternitaj pro tiom da neĝo.

Anticipe mi anoncis mian viziton kaj okazigon de mia koncerto de mondaj muzikiloj, do kiam mi alvenis al la kunvenejo, jam kolektiĝis 3 viroj kaj 4 virinoj. Mi miris, kial mezaĝaj viroj venas. Ĉu ili estas senlaboraj aŭ laboris nokte? Dum 90 minutoj mi montris miajn talentojn al ili kaj amuzigis ilin, sed iliaj mienoj neniam fariĝis brilaj eble pro malkontento kaj maltrankvilo pri sia vivkondiĉo.

Kolerego de ŝia eksa lernanto

Je la 3a kaj 20 minutoj mi decidis foriri per la aŭtomobilo de eksa lernanto de s-ino Taĉibana. Dume mi havis iom da libera tempo, do mi promenis en la tereno, kaj demandis lin, kiom estas kvanto de radioaktiveco tie, kaj li montris ciferojn montritajn sur la bultenejo apud la kunvenejo. La ciferoj estis ĉirkaŭ 0,18 mikrosivertoj, do malpli grandaj ol la permesita maksimuma normo de 0,23. Li diris: “La terenon de la domaro oni purigis, do la ciferoj ne estas grandaj, sed ..., venu al mia domo”. Li kondukis min al sia domo. Malantaŭ ĝi estis malgranda herbejo ĉirkaŭata per barilo.

“Tiun ĉi lokon oni ne purigis, do la cifero estas granda”. Mi etendis mian brakon kun dozmetro super la herbejo, kaj la cifero tuj grandiĝis al 0,24.

Li plu kondukis min al alia loko ekster la barilo, kie la loĝantoj povas libere promeni. Mi mezuris radioaktivecon tie, kaj la cifero tuj atingis 0,80. Li kolere diris al mi: “Ni rifuĝis de mia urbo Namie al tiu ĉi loko, ĉar tie estas radioaktive poluite. Kial ni devas denove loĝi en tiu ĉi poluita loko? En la urbo Namie nun troviĝas distriktoj malpli poluitaj ol ĉi tie”. Li jam petis de la urbo Motomija, ke oni purigu la ĉirkaŭaĵojn de la provizora domaro, sed la urbo respondis, ke la tereno apartenas al la ŝtato, do la urbo ne povas fari ion pri ĝi. Li plu petis de la urbo, ke ĝi transsendu lian peton al la ŝtato, sed la respondo ne venis.



La kampo estas purigita, sed trans la kampo estas poluite.

En la aŭtomobilo al la stacidomo lia kolero ne mildiĝis. “Antaŭe mi havis mian etan fabrikon pri aŭtomobilriparado, sed ĉi tie mi ne povas labori. Mia vivo dependas de la kompensa mono de TEPCO, sed post 2 jaroj ĝi ne plu pagos al mi. Mi devos translokiĝi de la provizora domo ien, ĉar la loĝrajto eksdatiĝos post 2-3 jaroj. La registaro kaj TEPCO certe atendas nian morton. Se ni mortos, ili ne bezonos pagi al ni kompensan monon. Ili ne zorgos pri niaj plendoj kaj kritikoj. Lokaj homoj ne estas amikaj al ni, miskomprenante, ke ni ricevas multe da kompensa mono. Mi volus diri al

ili: “Mi volonte donos al ili tiun sumon kaj la provizoran domon, se ili donos al mi ilian domon anstataŭe”.

Tiu ĉi provizora domaro izolite situas en la montaro, kvazaŭ ĝi estus forĵetita. La loĝantoj ne povas ĝui homajn rajtojn garantiitajn de la japana konstitucio. S-ino Taĉibana diras: “La registaro kaj TEPCO tre lerte uzas monon por estigi diskriminacion kaj malamikecon inter ni, enmigrintoj, kaj la loĝantoj. Se ambaŭ interbatalas, ili povas esti trankvilaj, ĉar neniu kritikas ilin. Troviĝas ruzaj homoj kaj en la registaro kaj en TEPCO”. Estas kompreneble, ke ŝi kaj ŝia eksa lernanto estas koleraj kontraŭ ili. S-ino Taĉibana batalas kontraŭ ili, sed tiu eksa lernanto estas pesimisma pri ŝia batalo. Li diras: “Ŝi kontraŭbatalas en la juĝejo, sed tio tute ne estas bato al ili. En kelkaj jaroj ŝia batalo finiĝos nebule sen rezulto”.

Antaŭe s-ino Taĉibana diris al mi: “Mi ne translokiĝos de la provizora domo kaj vidos, kio okazos fine”. Ŝajnis al mi, ke ŝi ankoraŭ ne perdis sian batalemon, sed ŝi jam estas 76 jara. La batalo en la juĝejo daŭros longe. Vere nuklea akcidento estas kruela. Ĉiuj loĝantoj laŭ la marbordo de Fukuŝima suferas pro la akcidento. Malgraŭ tio la registaro aprobos refunkciigon de nukleaj reaktoroj en Japanio, kio povos naski novajn suferantojn. Vere mankas al la ĉefministro Abe kaj lia partio homeco kaj amo al la popoloj. Kolero de s-ino Taĉibana estas “terpoto kontraŭ ferpoto”, nome malfortulaj plendoj al fortuloj, sed ni kiel sinceraj homoj, kiuj havas respondecon pri la sekvantaj generacioj, ne povas rezigni batali. Ni devas tenadi alte nian sloganon “Ni ne permesas la politikon de Abe”.